

N°175
juillet
août
septembre
2016

LA INFORMILO

N° 175
julio
aŭgusto
septembro
2016

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto
France-Est

ESPERANTO
2016
Justa komunikado

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 16€

Reta abono: 7,50€



Lýdia Machová est une jeune interprète professionnelle slovaque qui parle couramment une dizaine de langues, dont l'espéranto. Elle en a donné la preuve lors du 101ème congrès mondial d'espéranto (juillet 2016) à Nitra (Slovaquie). Dans sa conférence devant un amphithéâtre plein à craquer – elle a même dû répéter sa conférence devant un auditoire tout aussi important – elle a présenté ses méthodes d'apprentissage des langues en insistant sur la motivation absolument nécessaire, mais aussi sur la nécessité d'un apprentissage régulier et assidu.

Notons qu'elle a avoué qu'elle regrettait de ne pas avoir commencé par l'espéranto qui lui aurait encore davantage facilité la tâche.

Personne ne sera donc étonné d'apprendre que parmi les 350 personnes d'une rencontre de polyglottes qui s'est tenue à Berlin au mois de mai 2016, une centaine d'entre eux parlaient également l'espéranto. Ils venaient de 50 pays.

Quelle ouverture sur la diversité du monde!

Postkongreso ĉirkaŭ Slovakio

Tuj post la solena fermo de la kongreso, kiu okazis ekster la ĉefa kongresejo, necesis atingi la parkejon de la universitata restoracio. Tie, aŭtobusoj jam atendis la post-kongresanojn.



La postkongreso P1 **Ĉirkaŭ Slovakio** celis atingi la Tatron Montaron en la nordo. Survoje ni unue haltis en la urbo Banská Bystrica, malnova mineja urbo. Tie ni povis admiri la preĝejon de Francisko Xavier kaj ties horloĝ-turon.

En la urbo Svätý Kríž ni vizitis tre imponan evangelian ligno-preĝejon, konstruitan nur per ligno, eĉ sen najloj.

En la apuda tombejo troviĝis la tombo de Albert Ŝkarvan, iniciatinto de Esperanto en Slovakio kaj verkisto de vortaroj kaj lernolibroj en Esperanto por Slovakio.

En la vespero ni alvenis al Kežmarok, kie estis nia hotelo por 3 noktoj.

La vespermanĝo estis tipa slovaka menuo kun knedlikoj.



Tiu preĝejo de la jaro 1729 apartenas al la plej grandaj ligno-konstruaĵoj en meza Eŭropo. Konstruita fare de Jozef Lang en la komunumo Paludza, sed lige kun la ekesto de la lago Liptovska Mara, ĝi estis malmuntita kaj restarigita en la komunumo Svätý Kríž. La bazo de la preĝejo longas je 43 metroj kaj havas la formon de kruco. La preĝejo kapblas enteni preskaŭ 6000 vizitantojn.

Bedaŭrinde oni ne rajtis foti la internojn de la preĝejo. Tial ili restu sekretaj, kaŝitaj kaj ne montrindaj???



Albert Ŝkarvan iniciatis Esperanton en Slovakio. Li estis slovaka kuracisto, verkisto, pacisto kaj esperantisto.

Sur tiu memor-plako estas skribita en Esperanto

Kio estas falko sen flugiloj? Kio homo sen libereco?



En la posta tago, ekde la urbo Kežmarok, eblis facile atingi la Tatron montaron. Ni celis la nacian parkon Pieniny, tie la rivero Dunajec landlimas kun Pollando kaj estas la plej granda natura kanjono en meza Eŭropo.

En malnova tempo arbo-hakistoj flosadis la arbo-trunkojn de tie ĝis la norda maro. Iom simile oni proponas al turistoj flosadon sur lignaj flosoj.



Nia grupo estis dividita en du partoj por plenigi du flosojn, kiuj tute ne havis motoron. En ĉiu floso esti du stirantoj por gvidi ĝin per longaj stangoj, ĉe pli kvieta parto de la rivero, oni eĉ proponis al turisto transpreni la stangon. La tuta navigado daŭris iom pli ol duonhoron. Dume eblis ankaŭ ĝui la belan naturon kaj la majestajn montojn de Pieniny.



Post la alveno la flosoj estis transportataj per kamionoj al la startejo. Dume nia grupo promenis laŭlonge de la rivero por atingi en la parko tute pitoreskan restoracion.



Sur la vojo al la restoracio troviĝis multaj lignaj skulptaĵoj, kio montras, ke inter la lignohakistoj estis ankaŭ artistoj. En la restoracio ĉiu propradezire mendis laŭ le menukarto sian manĝon. Sed ne ĉiuj ŝatis la laŭtan muzikon de folkloro ensemblo ĝuste dum la manĝo. Tio malebligas konversaciojn kaj amikajn babildadojn. Sed ni toleris.



En la posttagmeze ni plu-vojaĝis al historia juvelo, la plej bela urbo Spiš Levoča. Ĝi allogas per malnovaj stratetoj, interno de preĝejo kaj ĉefe per verkoj de ligno-skulptisto Majstro Pavol de Levoča, kiu faris la plej altan lignan altaron en la mondo en la jaroj 1508 –1517. Ĝi altas je 18,62 m kaj larĝas 6,27 m. Ĝi estas nur el ligno sen najloj. Tamen ĝin oni ne rajtis foti. Ĝi restu kaŝita kaj ne montrita. Sur la placo de la urbo troviĝis fera kaĝo, ŝajne iam uzata por puni kaj publike humiligi klaĉulinojn.






Jen nova tago, sed tiam la ĉielo iom furiozis per nigra pluv-nuboj. Ni ja sukcesis ĉirkaŭ-promeni la lagon ĉe la vilaĝo Štrbské Pleso, sed poste ekpluvis. La programo estis iom ŝanĝita per vizito al tre interesa geomorfologia muzeo.

Intertempe ĉesis la pluvo. Tiam estis proponita vizito al la vilaĝo Smokovec. Necesis unue pied-grimpi la monton por atingi tiun vilaĝon kun multaj malnovaj (aŭ eble eĉ novaj) ligno-domoj. En unu el ili, oni klarigis pri la tradicia laboro de virinoj por teksu vestaĵojn el lino, kiu estis surloke produktitaj.

Tra tute deklivaj stratoj eblis admiri la aspekton de la tuta vilaĝo tiom fore sur monto. Ĉu kompati aŭ admiri ties loĝantojn?



La vespermanĝo okazis en tradicia restoracio por ĝui la slovakon gastronomion: tradicia tatra vespermanĝo kun akompano de popola muziko.



En la posta tago jam necesis forlasi la hotelon en Kežmarok por direktiĝi al Bratislava, kie finiĝos la postkongreso.

Malgraŭ longa trafik-ŝtopiĝo ni sukcesis viziti la vilaĝon Vlkoľnec. Tie troviĝas 45 domoj de popola arkitekturo kaj dominanta ligna sonoril-turo.

En la vespero ni jam atingis la ĉef-urbon kaj povis ekloĝi en hotelo. Fakte temis pri ŝipo-hotelo sur la Danubo.



Tamen supozeble tiu ŝipo tute ne povis navigi kaj estas pli/malpli fikse metita.

Jen Bratislava la ĉef-urbo de Slovakio kaj ĝia elstaranta burgo sur la maldekstra bordo je 85 m super Danubo.

La ŝtona burgo estis konstruita en la 10-a jarcento, kiam la regiono estis parto de Hungara reĝlando, rekonstruita en la 15-a jarcento en gotika, en la 16-a jarcento en renesanca kaj en la 17-a jarcento en baroka stiloj. En tempo de regado de Maria Teresia la burgo estis sidejo en la hungara parto de Habsburga dinastio. En la jaro 1811 la burgo forbrulis ĝis la fundamentoj kaj restis en ruinoj ĝis la 50-aj jaroj de la 20-a jarcento, en la jaroj 1953-1968 ĝi estis rekonstruita plimulte en la baroka stilo. Pri ties savo meritis signifa ĉeĥa arkitekto Alfréd Piffel. En la jaro 1961 la burgo estis proklamita kiel ĉeĥoslovaka nacia kultura memorigaĵo, nuntempe ĝi estas nacia kultura memorigaĵo de Slovakio.

Ekde la jaro 2008 okazis rekonstruo de la burgo, kiu estis finita en la jaro 2013. Ties celo estas redoni al la objekto la aspekton el la 18-a jarcento. Dum la tempoj de riparoj estis transloĝigita ekspozicio de Slovaka nacia muzeo. Somere de la 2009 estis finita riparo de tegmento, eksteraj fasadoj kaj instalita nova lumigo inkluzive de subburgejo.

Nia grupo unue vizitis la urbon piede, survoje ni trovis interesajn detalojn. Jen sur banko Napoleona soldato, kaptita de ĉarmulino, preferis resti surloke ol sekvi Napoleonon. Ĉe strat-angulo, kion gvatas tiu viro?

Trans la Danubo estis 4 pontoj, tiu moderna pendanta ponto, havis supre kupolon je formo de Nifo.

Al la burgo ni veturis per turisma trajneto. Survoje eblis ricevi klarigojn en 11 lingvoj, ni povis ĝui ilin en Esperanto per aŭskultiloj. Tiel ni atingis la supron de la monto antaŭ ol viziti la burgonmem.

Dum la tuta vojaĝo nin akompanis la ĉiĉeronino Katarina kaj la interpretistino, kiu ankaŭ nomiĝas Katarina.



Sur la ŝip-hotelo ni komune vespermanĝis kaj ĝuis la agrablan amikan internacian etoson.

Tekstoj kaj fotoj de Andreo



En suda Slovakio en la urbo Nitro komenciĝis la unua UK de la dua centoj. Slovakio gastigis unuan fojon la Universalan Kongreson de Esperanto. Samtempe komenciĝis slovaka prezidanteco en la konsilio de Eŭropa Unio. La prezidento de Slovakio Andrej Kiska fariĝis la Alta Protektanto de la 101-a UK. Por tiu granda evento estis eldonita por-okaza poŝtmarko. La verdaj flagoj abunde ornamis la stratojn kaj la urbon. Multaj banderoj kaj koloraj afiŝoj okulfrapis kaj urbanoj ne povis pretervidi kio okazas. Slogano “Bunta lingvo Esperanto” penetris ĉie en butikoj, restoracioj, stacidomoj, stratoj. La urbestro de Nitro forte apogis la kongreson, plurfoje aperis en kelkaj eventoj kaj prizorgis grandiozan urban akcepton por invititoj. Esperantistoj povis senpage uzi lokajn busojn kaj havis rabaton en certaj taksoj. Tion profitis tiuj, kiuj loĝis en hoteloj centre de la urbo. Multaj kontentiĝis per bone ekipitaj studentaj loĝejoj. Nur la varmeĝo ĝenis pro manko de ventumiloj ankaŭ en la kongres-salonoj.

La kongreson gastigis la agrikultura universitato de Nitro, situanta en bela kaj granda parko. Partoprenis ĝin 1253 geesperantistoj el 60 landoj. La programo estis bunta kun multaj interesaĵoj. Amaso da fakprelegoj, kursoj, konferencoj, seminarioj, diskutoj, vojaĝoj, junularaj aranĝoj, filmoj, koncertoj kaj teatraĵoj malfaciligis la elekton inter tiom da allogaj samtempaj programeroj. Ne mankis tradicia aŭkcio brile gvidata de Humphrey Tonkin, lingvaj kursoj kaj ekzamenoj, ekumena diservo, prelegoj pri Slovakio, lingvistiko, Duolingo, ĝemelaj urboj kaj aliaj. Aparte interesa estis prelego pri: “Kiel efike lerni fremdajn lingvojn”. Pro granda sukceso ĝi devis esti ripetita. Ankaŭ la kongresa temo: “Socia justecolingva justeco” estis bone pritraktita. Dum la kongreso kunsidis diversaj fakuloj: juristoj, fervojistoj, ĵurnalistoj, matematikistoj, medicinistoj, sciencistoj, sennaciistoj, ateistoj, vegetaranoj kaj aliaj. La kongresa kuriero *Pribina* ĉiutage informis pri aktualaĵoj, ŝanĝoj, kun aldona listo de nov-aligintoj kaj ankaŭ la amaskomunikiloj abunde raportis pri la evento.

Dum la ekskursoj al diversaj lokoj la partoprenantoj ek-

konis belajn regionojn de Slovakio. Oni vizitis minejon, ĉevalbredejon, muzeojn, kastelojn, belajn historiajn urbojn kaj vinregionojn. En urbeto *Strekov* okazis vinfestivalo. Gaja etoso, vingustumado kaj muziko agrabligis sunan tagon.

La kongreson partoprenis multaj gejunuloj ĝuante apartan programon. Infanoj havis sian 45-an Internacian Infan-Kongreseton en la proksimeco de la kongresejo. Koreaj samideanoj prezentis kaj varbis al la venontjara kongreso. Estis proponita per-trajna karavano de Berlino al Seulo tra Siberio. Surloke jam pluraj interesuloj enskribiĝis al tiu projekto.

La Movada foiro okazis antaŭ la kongresejo, kie centoj da Esperanto-asocioj prezentis sian agadon. Dum la nacia vespero la profesia ensemblo *Lúčnica* ravis la ĉeestantojn per belega spektaklo. Ĝi estas la plej prestiĝa folkloro grupo kun longa tradicio en Slovakio. La prezento okazis sur la urba placo kaj estis spektata ankaŭ de civitanoj.

Impona kaj tre gaja estis la surstrata manifestacio de la antaŭlasta kongrestago. Unue la partoprenantoj viciĝis kaj formis liter-bildon UEA. Post fotado ili ekmarŝis akompanataj per tamburado kaj tele-regataj flugfotiloj de la kongresejo ĝis la centra urboplaco. Tie okazis tango prezento. Pli ol okdek paroj dancis post mallonga klarigo de necesaj dancopaŝoj por krei mond-rekordon de la slovaka tango. La celo estis atingita. Ekregis entuziasmo kaj ĝojo pro tiu sukceso. Post tiu rimarkinda spektaklo sekvis muzika festivalo kun partopreno de kelkaj slovakaj kaj Esperanto-ensambloj. La konata litova familia grupo “Sepa kaj Asorti” fermis la festivalon post la noktomezo.

Grandan dankon meritas LKK-anoj kaj ties ĉefaj organizantoj Peter Balaž kaj Dorota Rodzianko pro riĉa enhavo kaj bona organizado de la kongreso. Al la sukceso kontribuis multaj helpantoj, precipe el najbara lando Ĉeĥio. Bonŝance ĉi-foje oni tute ne aŭdis pri priŝtelitaj esperantistoj, kiel kutime okazas en grandaj kongresoj.

Liba Gabalda



Pliaj fotoj de UK sur la lasta kovril-paĝo

Angulo de la prezidanto

Karaj gesamideanoj,




Konsideru ĉi angulon iom speciala! Jesja! Post la interesege UK en Nitra mi eklegis akiritajn literaturaĵojn kaj tuj, ĝis ega kortuŝo, min ravis ĵus aperinta majstroverko de nia konata bardo **Mikaelo Bronštejn: *Mi stelojn jungis al revado.***

Tre certe vi jam malkovris kun konsterno la sorton de esperantistoj vivintaj inter ambaŭ mondmilitoj en okcidenteŭropaj faŝistaj ŝtatoj kaj plej amase dum la ruĝa faŝismo sovetunia. Mi citu du gravajn librojn ĉi-priajn: ***La danĝera lingvo*** de **Ulrich Lins** kaj ***Vivo de Lanti*** de **Ed Borsboom**. Jen pure rigoraj historiaj verkoj, kiuj nin cerbumigas!

Mikaelo Bronštejn siaflanke nun verkis 558-paĝan romanon, en kiu li ankaŭ citas eltiraĵojn el arkivoj ŝtataj, gazetaj, naciaj kaj esperantistaj por enkadrigi la rakontojn. En la romano vi rekonos la nomojn de elstaraj tiamaj esperantistoj rusaj, belorusaj, ukrainaj, baltlandaj, francaj, hispanaj, germanaj, judaj, ktp. Kompreneble ankaŭ kunludas UEA kaj SAT.

Sed kortuŝe li ankaŭ rakontas la vivon de imagitaj samideanoj, kies vivsorton ni akompanas kunsente. Ili lernis Esperanton, vizitis klubon, ekigis amikiĝojn. Okazis eĉ geedziĝoj. Krome: kia unua espero pri la „iela“ ŝtata subteno de Esperanto! Sed baldaŭ la feliĉo de ĉi tiuj samideanoj transformiĝadis al hororo dum la regado de la „sanga lipharulo“ Stalin, kiu la esperantistojn – same kiel multajn aliajn laŭdirajn kontraŭrevoluciulojn - sukcesis suspektigi pri spionado, subteno al la subita malamika Trocki kaj subfosado de la revolucio. Regis kalumniado, denuncado, malliberigado, torturado kaj kondamnado al enprizonigado kaj mortpafado. Jesja, la revolucio de la proletoj manĝis siajn proprajn infanojn!

Karaj gesamideanoj, dank'al Mikaelo Bronštejn ni ege emocie mergiĝas en la vivon de niaj samideanoj, kiuj havis la malbonan ŝancon vivi en terura epoko. La movado nun posedas plian majstroverkon de la originala esperantlingva literaturo. Nepre ĝin legu! E.L.



Esperanto-budo en Fontenoy-la-Joûte.

Le dimanche 14 août 2016, dès 9h nous sommes arrivées à Fontenoy-la-Joûte. Jacques était déjà là. Il était désolé car sa tonnelle était abîmée et la journée s'annonçait caniculaire. Heureusement, avec un peu d'ingéniosité nous avons réparé en partie l'abri.


Les visiteurs furent peu nombreux mais toutefois intéressés. Nous avons établi quelques contacts que nous espérons revoir à la rentrée à la MJC Desforges à Nancy. Hormis les fidèles du club de Nancy, seuls Jacques et Edmond ont participé à la tenue du stand et nous les remercions de leur active collaboration.

Dimanche la 14an de aŭgusto 2016, ni alvenis en Fontenoy-la-Joûte. Jacques jam ĉeestis. Li bedaŭris ĉar lia laŭbo estis defektita kaj la vetero anonciĝis tre varmega. Feliĉe, per iomete da lerteco, ni riparis parte la ŝirmejon.



La vizitantoj estis malmultaj sed tamen interesataj. Ni kontaktis kelkajn homojn, kiujn ni esperas revidi je la rekomendo de la kursoj en la MJC Desforges en Nancio.

Krom la fideluloj de la nancia klubo, nur Jacques kaj Edmond partoprenis en la buda deĵoro kaj ni dankas ilin por ilia vigla helpo.

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Secrétaire adjoint</i>	S-ino Catherine KREMER 20, Voie Sacrée 55100 VERDUN	03.29.85.05.09 03.02.13.01.32	catherine2.kremer@laposte.net
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.69.54.46.93	andreo.ag16@free.fr por pezaj dokumentoj prefere al andreo.ag09@gmail.com
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Assesseeurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinelcolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Jacques PINEDA	03.89.42.88.54	pineda.ventron@gmail.com
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	simone.kiry@gmail.com
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Madette AST	03 87 01 32 85 06 70 94 11 84	madette20@hotmail.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net

Abono al La Informilo →	16 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← <i>Paiement par chèque au nom de</i>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← <i>Paiement par virement au compte</i>
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Lýdia Machová	15. Aŭtuna staĝo en Rastatt	<p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Esperanto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par l'imprimerie Sprenger</p>
2. Postkongreso tra Slovakio	16. SAT-kongreso en Herzberg	
3. Postkongreso tra Slovakio	17. SAT-kongreso + Ekologio	
4. Postkongreso tra Slovakio	18. Ekologio	
5. Postkongreso tra Slovakio	19. Distraĵoj, humuraĵoj	
6. UK en Nitra	20. Paralela universo	
7. Komitatoj kaj Menuo	21. Abono + libroj	
8. Angulo de la prezidanto	22. Itala kongreso	
9. Libro Momo + kanto	23. BET-52 en Litovio	
10. Libro-servo	24. ILEI-kongreso	
11. Libro-servo	25. ILEI-kongreso	
12. IFEF-kongreso en Colmar	26. Nova urbo	
13. IFEF-kongreso en Colmar	27. Nova urbo	
14. Aŭtuna staĝo en Rastatt	28. Fototeko UK	

Momo, la Histriko

Momo, le Porc-épic

de Catherine Hel kaj Elina Dianta Greiner

Ne povante pli longe suferi tedon, Momo la Histriko decidis elarbariĝi, por renkonti aliaĵojn kaj aliulojn. Tiam komenciĝas por la juna besteto aventur-plena vojaĝo, ĝis ne-atendita kortuŝa fino.

Jarfinaj festoj alproksimiĝas ĉiam tro rapide, do de nun pensu mendi neordinaran donacon por viaj gefiloj, genepoj, genevoj aŭ geamikoj :



La rakonto estas dulingva fabelo originale verkita en Esperanto kaj tradukita al la franca. La Esperanta teksto kaj ties traduko troviĝas sur la sama paĝo, aliflanke enestas la 15 originalaj kolor-riĉaj ilustraĵoj. La libreto kun kvadrata formato 21x21 cm, enhavas tridek paĝojn en bonkvalita papero, kun kovrilo-paĝo glacegita.

La libreto estas akirebla okaze de nia venonta aŭtuna staĝo en Rastatt ĉe la libroservo sed ankaŭ ĉe de la aŭtorino kun dediĉo.

La libro estas mendebla ĉe la grupo de Nancy ĉe:
esperanto-nancy-54@laposte.net

Kostoj (sen afranko) :

13 € po 1 ekzemplero

11 € po ekde 3 ekzempleroj

10 € po ekde 5 ekzempleroj

La sendokostoj aldoniĝos al la menciitaj prezoj.

Por pli da informoj retmesaĝu al
esperanto-nancy-54@laposte.net



La hejmo, kie mi kreskis (kantata de Françoise Hardy en 1966)

Kiam mi revokas pasintaĵojn,
Mi vidas la hejmon, kie mi kreskis
Multe da bildoj mi memoras
Rozojn en ĝarden' mi revidas
Tie, kie vivis arboj, nun
Urbo staras
Amataj dom' kaj floroj, hodiaŭ
Ne plu ekzistas
Ĉiuj miaj amikoj sciis ridi
Ili volonte kunludis kun mi
Sed en la vivo ja ĉio finiĝas
Kaj devis mi foriri kun larmoj en okuloj
Miaj amikoj min demandis : Kial plori?
Malkovri mondon estas pli bone ol resti
Tie vi trovos, kion ĉi tie oni ne vidas
Urbon, kiu nokte dormas en la lumo
Kiam mi lasis infanaĝ-lokon
Mi jam sciis, ke tie restis mia kor'
Miaj amikoj enviis mian sorton

Sed ĉiam mi pensis pri iliaj feliĉ'
Kaj senzorgec' , kiuj ilin ridigis
Mi ankoraŭ aŭdas min diranta:
Mi revenos, iun tagon, al vi ridantaj
Ja, mi veturos iam al miaj memoraĵoj
Tempo pasis, kaj mi estas reveninta
Vane serĉanta la karan hejmon
Kie estas la ŝtonoj kaj la rozoj?
Kie estas ĉio, kion mi amegis?
El tio estas plu nenia spur'
Aliaj homoj, aliaj domoj anstataŭas miajn
Tie, kie vivis arboj, nun
Urbo staras
Kaj la hejmo ... kie estas la hejmo,
en kiu mi kreskis?
Mi ne scias, kie estas hejmo
La hejmo , kie mi kreskis
Kie estas mia hejmo ? Kiu scias, kie estas mia hejmo ?
Kie estas la hejmo ?



El nia libroservo



Informoj

La libroservo kompreneble partoprenos la venontan komunan staĝon en Rastatt, la 4an/6ajn de novembro... kaj multaj el ĝiaj libroj estos tie haveblaj !
 Se vi volas esti certa tie malkovri libron (sen devigo ĝin aĉeti) el la listo aperanta en la retejo de esperanto France Est: <http://esperanto.france.est.free.fr>, informu min: per la jena retadreso: libroservo.efe@laposte.net

Jean-Luc Thibias




Novaj libroj:



Paradizo Ŝtelita, Romano, Trevor Steele,) *Flandra Esperanto Ligo* 336 paĝoj. **19,20 €**.

Nova romano de tre konata esperantista verkisto, kies libroj estas tradukitaj alilingven. Ĉi foje pri destino de aŭstrala aborigena popolo.

Pri legitaj libroj:



Romano de Aleksej Konstantinoviĉ Tolstoj (1817-1875), kiu venigas nin en la landon de Caro Ivano la Terura -aŭ pli ĝuste, laŭ, Rusoj, la "timinda" - (1530-1584). Juna nobela oficiro (Princo Serebrianiĵ), post kvinjara milito kontraŭ Litovanoj, esperas trovi sian amatinon por geedziĝi. Kompreneble, la afero ne tiel glatos! Li baldaŭ konstatas, ke Ivano multe ŝanĝiĝis kaj adoptis teruran novan politikon (opriĉninon). Por fortigi la centran potencon malfavore al bojaroj, la caro kreis novan oficaron (opriĉnikoj), kiu per ĉiuj rimedoj luktas kontraŭ la pasintaj nobelaj posedantoj, cele malfortigi aŭ malaperigi ilin.

Ivano aspektas kiel suspekta kaj senkompata homo, preta faligi, per kruelaj rimedoj ĉiujn oponantojn (aŭ supozitajn), kiuj povus malhelpi lian politikon, cetere plur-flanke pozitivan por la evoluo de la lando. Kompatinda Ruslando plurfoje spertis similajn periodojn, precipe en la tempo de Petro la Granda kaj ...Stalino!

Vidu Inf
173
284 p
20,10 €

La romano sufiĉe samspecas tiujn de francaj romanistoj de la 19a jarcento (A.Dumas, P. Feval aŭ V. Hugo). Agrable leginda, ĝi bone prezentas la vivon en Ruslando kaj en la cara Kortego, kaj diversajn specojn de karakteroj: alt-animaj, kruelaj, kuraĝaj, fiaj, oportunemaj, kelkfoje miksitaj. La romanon tradukis Maria Ŝidlovskaja en 1912. Tiu traduko estis iom reveziita okaze de la novaj eldonoj de Mondial en 2004 kaj 2008. La stilo, flua, bone respektas la spiriton de Esperanto.

Por mendi librojn:

- Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-dorsan mendilon)
 - per e-poŝto al "libroservo.efe@wanadoo.fr"
 - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
- Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
- Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.
Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO"
IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97

Mendilo

Bonvolu sendi tiujn librojn al jena adreso:

S-ro / S-ino

En

la

Subskribo:



Nenovaĵoj ĵus alvenintaj



1. **Ekzercaro 2a nivelo**, Ekzercaro, **Julian Hernandez Angulo**, *Kuba Esperanto Asocio?*, 64 p. 4 €. Tradicia ekzercaro por progresantoj, kiuj deziras perfektigi, precipe en gramatiko, per simplaj ekzercoj.
2. **Langue internationale**, movado, **Zamenhof**, *F.E.L.*, 2006, 48 p, 5 €. Represo de la franclingva versio de la unua libro pri la internacia lingvo. La originalo aperis la 12an de septembro 1887, iom post la pola versio (9a de julio) kaj la rusa (21a de majo). La reguloj de la lingvo estas rapide klarigitaj, kaj ĝia simpleco elmontrita. Aldoniĝas vortaro je 900 vortoj. Kaj propono, ke la legantoj sendu respondkuponon, kun iliaj promesoj lerni la lingvon, se 10 milionoj da homoj sendas la saman promeson. Certe tute iluzia ŝajnas hodiaŭ tiu espero esprimita en jaro, kiam multaj homoj, eĉ en la plej evoluintaj landoj ne sciis legi kaj kiam la komunikaj teknikoj estis ankoraŭ limigitaj! Sed ĉu nun, post la eksplodo de interreto, ĝi ne estus realigebla? Ĉu ni ne kapablus, pere de la reto, rikolti 10 milionojn da promesoj?
3. **Kalejdoscopa rememoro**, verkaro, **Alberto Fernandez**, *F.E.L.*, 2007, 216 p. 15 €. Duparta kolekto de tekstoj de Alberto Fernandes, naskiĝinta en Hispanio sed vivanta en Nederlando de post 1937, pro la interna milito. La aŭtoro verkis multajn sciencajn artikolojn en la revuo Homo kaj Kosmo, eldonitajn poste subforme de agrable leginda libro titolita “sengenaj dialogoj”. La unua parto de kalejdoscopa rememoro prezentas popoligitajn sciencajn temojn kaj priajn demandojn, la dua (“progresema ideologio”) kolektas pli politikajn tekstojn.
4. **Kolera afero**, Krimromano, **Ronald Cecil Gates**, *F.E.L.*, 1993, 88 p, 5 €. Kiel kutime krimo, serĉado de kulpulo, kaj nur 88 paĝoj legendaj por ekscii ties nomon!
5. **Katorelo**, romaneto, **Jeannette van Mens**, *F.E.L.*, 1998, 84 p. 6 €. La aventuroj de kato, kiu promenas iom ĉie en la kvartalo (kio ne ĝenas min, kondiĉe, ke ne en mia legom-ĝardeno!)
6. **Nemave edifi**, spionlibro! **Stefan Mac Gill**, *F.E.L.*, 2007, 272 p, 20 €. Amuza promenado tra enigmoj kaj teatraĵoj kiuj agrable progresigas la scipovon de esperanto.
7. **Servisto de l'ideo** Movado, **Mark Fettes**, *F.E.L.* 1995, 120 p. 18 €. 50 jaroj ĉe Universala Esperanto Asocio 1908-1958 : duonjarcento de esperanto asocio tra la spertoj de Hans Jakob, oficisto ĉe U.E.A.

Dio ne havas eklezion Trevor Steele FEL 2015

Kiu ekde la komenco de la verkista kariero de Trevor Steele tralegis liajn jam aperintajn verkojn jam malkovris ĉi tiun “homecan homon”? Jam li rakontis pri sia vivo ekde l'infanaĝo, tra la junaĝo kaj la plenkreskula periodo.

Ĉifoje li aperas en la diversaj figuroj de la romano *Dio ne havas eklezion*. La rakonto disvolviĝas sur la insuleto Hakilule en la Pacifika Oceano. La aŭtoro travidiĝas en la mond-fama aŭstralia fotoĵurnalistino Bruce Golding, tiel nomata esplor-ĵurnalistino, kiu ĝisfunde kaj kritikeme esploras la plej kaŝitajn okazaĵojn. Trevor Steele ankaŭ sin esprimas tra la irland-devena ne tre ortodoksa katolika pastro Patrick O'Dwyer-similanta la irlandan pastoron Ian Paisley – same kiel tra la bela juna filino de la pastro (jesja), Perpetua kaj ties polinezia forpasinta animista patrino Alani, kiu havis “pli da spirita saĝo ol ĉiuj papoj kune”!

Kaj tiam sekvu ilian batalon kontraŭ spekulantoj kaj grand-potencaj internaciaj societoj, kies nura celo estas la monprofito. Kaj ne ĝenas ilin koruptado kaj eĉ mortigoj.

E.L.



Kongresnumero: _____

ALIĜILO por la 69-a kongreso de IFEF 16-a ĝis 23-a de majo 2017 Colmar Francio

LKK-adreso: André Grossmann
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM Francio

Retadreso:

jeanripoche@wanadoo.fr
andreo.ag16@free.fr

Pagoj por Francio:

Per ĝiro al André Grossmann
CCP 819 34 U Strasbourg
aŭ per franca ĉeko al
André Grossmann, 5 rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

Internacia ĝiro al: André Grossmann

IBAN: FR6920041010150081934U03669

BIC: PSSTFRPPSTR

aŭ al **UEA-konto de TAKE** ekat-i

Familia nomo	Persona nomo	Naskiĝjaro
Adreso		
Telefono: _____ Poŝtelefono: _____		
Ret-adreso: _____ @ _____		
IFEF-ano <input type="checkbox"/> jes <input type="checkbox"/> ne <input type="checkbox"/> viro <input type="checkbox"/> virino		
Mi antaŭpagas jenan sumon _____ eŭroj		
per <input type="checkbox"/> ĝiro <input type="checkbox"/> franca ĉeko <input type="checkbox"/> UEA-konto de TAKE		

Kongreskotizo en eŭroj	Ĝis	Poste	Sumo
IFEF-membro	31.12.2016	60	80
Familiano, junulo ĝis 30 jaroj, kaj IFEF membro loĝanta en B-landoj laŭ UEA-difino		30	40
Ne IFEF-membro		70	90
Ĉambro-perado		5	
D1a: Urbovizitado Colmar, piede		3	
D1b: Urbovizitado Colmar per trajneto, 45 mn		10	
D2: Fervoja muzeo Mulhouse		22	
D3: Kaysersberg, Riquewihr, Hunawihr-Ĝardeno de papilioj		18	
Tuttaga ekskurso kun tagmanĝo – T1: Strasburgo, Obernai		40	
Tranoktado laŭ elekto (minimуме 1 nokto)			
Libervola donaco al la kongresa kaso			

Postkongresoj				
Marde 23.05	09.00 18.00	Haut-Koenigsbourg, Ribeauvillé, Hunawihr: Parko de la cikonioj kaj lutroj, sen tagmanĝo: restoracio surloke; ebleco pikniki	35	
Merkrede 24.05	09.00 18.00	Eguisheim, Ungersheim-Ekomuzeo sen tagmanĝo; ebleco pikniki	35	
			Sume	

Ĉambro mendilo

Nepre menci, kaze de plurlita ĉambro, la kunloĝanton/-jn! Alie vi pagos la prezon por unulita ĉambro.

Mi loĝos kun:kongresnumero.....

Mi mendas la jenajn noktojn (bonvolu signi)

Hotelaj prezoj en eŭro: por unu nokto kaj unu persono, inkluzive kun matenmanĝo.

Noktoj	14-15	15-16	16-17	17-18	18-19	19-20	20-21	21-22	22/23	23-24	24-25	25-26

Colmar - Hotelo Primo Balladins, dustela		
1 lita ĉambro		49 €
1 lito en 2 lita ĉambro		31 €
1 ĉambro en duobla geedza lito (por 2 personoj)		62 €
1 lito en 2 lita ĉambro por handikapitoj (entute 3 ĉambroj)		31 €
1 lito en 3 lita ĉambro		24 €
1 lito en 4 lita ĉambro		22 €

ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ

- Ĉiu partoprenanto bonvolu plenigi kaj sendi apartan aliĝilon por la kongreso al la adreso de LKK.
- Sendu la pagon nur en Eŭro al la indikita bankkonto de la LKK. Oni traktos la aliĝilon nur post alveno de la pago.
- Se vi pagas por alia persono, kiu nepre devas sendi apartan aliĝilon, menci precizajn informojn pri la koncerna persono: nomo, lando, kompleta adreso.
- Kongres-kotizo neniuokaze estas repagebla. La pagoj por la ceteraj servoj estas repageblaj post la depreno de 10% por administrado, kondiĉe ke LKK ricevos la **mal-mendon ĝis la 31-a de marto antaŭ kongreso.**
- LKK konfirmos la akcepton de ĉiu aliĝilo post la ricevo de la koncerna pago per indiko de via kongresa numero kaj de ĉiuj antaŭmenditaj kaj antaŭpagitaj servoj.
- LKK havas la rajton ŝanĝi la prezojn, se alta inflacio aŭ aliaj ne antaŭvideblaj kondiĉoj postulus tion.

Mi konfirmas, ke mi konsentas kun la ĝeneralaj instrukcioj presitaj en ĉi tiu aliĝilo kaj aparte deklaras, ke mi havas san- kaj akcident-asekuron por mia restadperiodo en Francio dum la 69-a IFEF Kongreso kaj Postkongreso.

Mi konsentas (ne konsentas), ke mia retadreso estu skribita en la kongresa libro (substreku).

Mi venos en Colmar per
la-an de majo je la-a horo.

Loko:.....

dato:.....

Subskribo:.....

PROVIZORA PROGRAMO

Mardo 16.05	10.00 – 21.00 17.00 – 18.00 18.00 – 19.00 19.00 –	Akceptejo / Informejo, en akceptejo de la hotelo Kunveno de la IFEF-estraro kaj LKK, hotelo Kunsido de la IFEF-estraro Interkona vespero - Itala restoracio apud hotelo
Merkredo 17.05	08.00 – 10.00 10.00 – 12.00 13.00 – 20.00 12.00 – 12.30 14.00 – 18.00 20.30 – 22.00	Akceptejo / Informejo, en akceptejo de la hotelo Solena Inaŭguro, salono Catherinettes Akceptejo / Informejo, en akceptejo de la hotelo Komuna fotado, Gazetara konferenco Urbo-vizitado (D1a, b) – Colmar (piede aŭ per trajneto) Vin-gustumado komuna por ambaŭ grupoj Kultura programo: La grupo "VOGESIA" de Colmar salono Catherinettes
Ĵaŭdo 18.05	09.00 – 12.00 09.00 – 12.00 14.00 – 16.30 14.00 – 16.30 16.45 – 18.00 20.00 – 21.00 21.00 – 22.00	Nepublika komitat-kunsido , Catherinettes E-kurso en la hotelo Kunsido de la Faka Komisiono, salono Catherinettes Ateliero pri informadiko, Catherinettes Movadaj aferoj; kunsido de la laborgrupoj, publika Catherinettes Prelego pri la regiono: Elzaso/Alzaco - Edmond Ludwig Catherinettes Venonta kongreso sin prezentas Catherinettes
Vendredo 19.05	09.00 – 12.00 09.00 – 12.00 14.00 – 18.00 20.00 – 21.00 21.00 – 24.00	Plenkunsido ; salono Catherinettes E-kurso en la hotelo Ekskurso D2 – Fervoja muzeo Mulhouse Prelego: Vizitu Baraton per trajno , Liba kaj Floréal Gabalda Catherinettes Dancvespero kun Fernando , Catherinettes
Sabato 20.05	09.00 – 12.00 09.00 – 12.00 09.00 – 11.00 09.00 – 11.00 11.00 – 12.00 14.00 – 19.00 20.30 – 22.00	Libroservo funkcias, Catherinettes E-kurso en la hotelo Kunsido de FFEA , Catherinettes Kunsido de la Faka Komisiono, salono Catherinettes Movadaj aferoj; kunsido de la laborgrupoj, publika Catherinettes Ekskurso D3 – Kaysersberg, Riquewihr, Hunawihr - Ĝardeno de vivantaj papilioj Kultura vespero - Koncerto de Grazia Barboni , Italio Catherinettes
Dimanĉo 21.05	09.00 – 12.00 09.00 – 12.00 12.00 – 12.30 15.00 – 15.30 15.30 – 17.30 19.30 – 23.00	Libroservo funkcias; Catherinettes Ĉefa prelego kaj fakprelegoj , salono Catherinettes Solena fermo Kunveno de la IFEF-estraro kaj LKK; hotelo Kunsido de la IFEF-estraro; hotelo Ĝisrevida vespero, Catherinettes
Lundo 22.05	09.00 – 19.00	Tuttaga ekskurso – Strasburgo, Obernai

ANONCO pri la fakprelegoj

Laŭ la programo de la 69-a IFEF-kongreso estos prezentitaj pluraj fakprelegoj.

La resumon de la ĉefa fakprelego estu sendita **al Rd ĝis la fino de januaro 2017** por aperigi ĝin en la nr. 2 de IF, kaj **al Gv de la Faka Komisiono ĝis la fino de marto 2017**. La preleg-dezironoj estas petataj anonci sin kaj prezenti la resumojn de la prelegoj al LKK kaj al Gv de FK antaŭ la 31-a de marto 2017 por ke ili estu enmetitaj en la programon de la kongreso.

Faka Komisiono elektos laŭtemajn altkvalitajn prelegojn el diversaj landoj, por ke la ĉeestantoj povu interŝanĝi kaj ĝui la sukcesajn rezultojn pri la fakaj scienc-teknikaj esploroj kaj pri la fervoja evoluo en la mondo.

Bonvolu sendi la prelegojn kun simpla memprezento pri la aŭtoro al la retpoŝta adreso: **esperanto@kabelmail.dk**.


Kiel atingi la kongres-urbon Colmar // hotelon// kongresejon

Aviadile al la flughaveno Bâle-Mulhouse aŭ Basel-Mulhouse. De tie aŭtobuso veturas al la plej proksima fervoja stacidomo de Saint-Louis (10mn). Poste per trajno al Colmar (40 mn)

Trajne: diversaj rapid-trajnoj TGV alvenas al Colmar de Parizo, de Marseille, de Svislando, de Germanio.

Aliĝiloj en formato A4 pdf kaj en A4 Word estas elŝuteblaj de la retejo: <http://mulhouse.esperanto.free.fr>
Eblas komputile plenigi la Word-aliĝilon kaj ĝin sendi aldone al retmesaĝo al niaj LKK

La hotelo Primo Balladins, 5 Rue des Ancêtres, Colmar troviĝas je 20 mn de la stacidomo.





kaj BAVELO
Invitas al

80a regiona staĝo kaj 38-a BAVELO-Seminario 4a - 6a Novembro 2016 en Rastatt



Martin
Ptasinski



Lu
Wunsch



La kastelo de la ĝardeno flanko

Dum la seminario ni loĝos refoje en Bildungshaus St. Bernhard, komforta seminariejo apud la centro de la urbo. Rastatt estas malgranda urbo, tamen plenplena de Eŭropa historio: 1714 en la freŝkonstruita kastelo okazis la intertraktado kaj la sigelado de la *Paco de Rastatt*, per kiu estis finita la *Milito pro la hispana sukcedo* – fora konsekvenco de tio estas interalie la plifortiĝo de la angla lingvo. Unu parto de la bukeda kurso estas dediĉita al ĉi tiu epoko tre interesa, tre influa ĝis hodiaŭ, sed tamen preskaŭ forgesita.



Kiel kutime ni proponas kursojn por komencantoj, progresantoj (Martin Ptasinski, maldekstre), ekparolantoj kaj bukedan kurson. Nova propono estas la ebleco plispertiĝi pri instruado per observado de sperta instruisto en la kurso de la progresantoj. En la bukeda kurso ĉi foje estos interalie parto pri publika agado kun Lu Wunsch-Rolshoven (dekstre) kaj Bruno Flochon, alia pri la historio de Rastatt kaj Eŭropo, nome pri la *Milito de hispana sukcedo* kaj ĝiaj konsekvencoj ĝis hodiaŭ (Ramon Perera kaj Alois Eder), pri novaĵoj el la libroservo (Jean-Luc Thibias).

La kursoj kaj la instruistoj
komencantoj - Rotraud Wetzl
progresantoj - Martin Ptasinski
instruobservado - (observi la instruiston de la progresantoj)

paroliga – Edmilson Lima Serejo
bukeda – Lu Wunsch-Rolshoven kaj Bruno Flochon, Ramon Perera kaj Alois Eder, Jean-Luc Thibias, Bernhard Eichkorn

Programo

vendredo, 4 novembro

14:30 - 17:00 eventuale ekskurso por frualvenintoj
17:00 - 18:00 alveno, aliĝo, ekloĝado en la ĉambroj, pliaj informoj
18:00 - 19:00 bonvenigo kaj vespermanĝo
19:00 - 20:00 enkonduko
ekde 20:15 vespera programo (konatiĝo, ludo)
poste knajpo

sabato, 5 novembro

07:30 - 08:30 matenmanĝo
09:00 - 11:45 kursoj
12:00 - 13:00 tagmanĝo
14:00 - 17:00 ekskurso (Riedmuseum – muzeo pri la regiona vivo)
17:00 - 18:00 la libroservo prezentas
18:00 - 19:00 vespermanĝo
danckurso kun Jochen
poste knajpo

dimanĉo, 6 novembro

07:30 - 08:30 matenmanĝo
08:30 - 09:00 redono de ĉambroj
09:30 - 11:45 kursoj aŭ ekskurso
12:00 - 13:30 resumo, tagmanĝo, adiaŭo
poste ebleco partopreni specialan gvidadon tra la ekspozicio „Rompiĝemaj valoraĵoj“ en kastelo Favorite (entute 12 €)



Alveturo: < <http://www.st-bernhard-rastatt.de/anfahrt/> germanlingve >

per publikaj transportiloj

Rastatt estas trajnstacio de la vojo Karlsruhe – Baden-Baden – Basel. La seminarejo estas atingebla de la stacio Rastatt per taksio, buso, piedoj (1,1 km).

Piede sur Bahnhofstraße direkte al „Stadtmitte“ ĝis trafikluma vojkruciĝo turnu dekstren kaj sekvu la sildojn „Krankenhaus“, post 900 m dekstre estas Bildungshaus St. Bernhard.

Buso 231 direkte al Wintersdorf ĝis haltejo „Am Hasenwäldchen“. Sekvu la veturatan direkton sur "Zaystraße", post 50 m maldekstre estas Bildungshaus St. Bernhard.

per aŭto

Rastatt aŭte atingeblas per ekspresvojo A5 (Karlsruhe-Basel). Venante sur A5 prenu elveturejon **Rastatt Süd**, daŭrigu direkte al Rastatt sur B3. Sekvu la straton dum preskaŭ 5 km, post maldekstra Mercedes-Benz-Kundencenter turnu dekstren je la sekva trafikluma vojkruciĝo. Post 800 m situas Bildungshaus St. Bernhard maldekstre. Aŭtolasejoj estas en korto.

Bildungshaus St. Bernhard
 An der Ludwigsfeste 50
 76437 Rastatt
 Tel: 07222 104 660
 Fax: 07222 104 6610

Koordinatoj:

latitudo: N 48°51'45.6"
 longitudo: E 8°12'11.8"

Kotizo: 30 €. Aparta oferto por junuloj ĝis 27: 60 € por ĉio (kotizo, tranoktadoj, manĝoj)
La aliĝo validas post alveno de via kompleta pago al unu el niaj kontoj.

Aliĝilo al la Bavelo/EFE-seminario en Rastatt

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	naskiĝjaro
1			
2			

Adreso:

Telefono:

Ret-adreso:

Pagenda: kotizo+tranoktadoj+manĝoj.....+.....+.....=.....

Mi pagas la sumon..... al Esperanto France-Est

Tranoktado (kun matenmanĝo):	vendrede/ sabte	sabate/ dimanĉer	1 nokto	2 noktoj
1-lita ĉambro kun duŝo			75 €	110 €
2-lita ĉambro kun duŝo			55 €	80 €
2-lita ĉambro sen duŝo			40 €	60 €
4-lita ĉambro sen duŝo			35 €	50 €

Nombro da manĝoj	vendrede	sabate	dimanĉe
matenmanĝo sen tranokto	10 €		
tagmanĝo	15 €		
vespermanĝo	11 €		
Mi ŝatas manĝi	vegetare	vegane	

Mi havas alergion kontraŭ _____

La kotizo rajtigas al elektita kurso. Ĝi ne repageblas.

Pagebla per ĝiro al
 CCP Esperanto France-Est
 1997 72 W Nancy
 per franca ĉeko al Esperanto France-Est
 sendata al
 André GROSSMANN
 5, rue des Pyrénées
 68390 BALDERSHEIM
 ret-adreso: andreo.ag16@free.fr

Aliĝilon bonvolu sendi al:
 prefere per ret-mesaĝo al
 inge.simon@esperanto.de
 aŭ poŝte al
 S-ino Inge SIMON,
 Brünner Str. 20
 DE-73431AALEN
 Tel. 00.49-7361/ 360 615,

- Mi partoprenas kurson
- komencantoj
 - progresantoj
 - paroliga
 - bukeda
 - instru-observado

LA 89-a SAT-KONGRESO EN HERZBERG am HARZ - SIEBER 16. - 23. 7. 2016



Ĉi-jare la SAT-kongreso okazis en la vilaĝo *Sieber*, kiu situas meze de Germanio en bela valo ĉirkaŭita de arbaroj de la Harz-montaro. Ĝi apartenas al la urbo *Herzberg am Harz - La Esperanto-urbo* kaj distancas de ĝi nur 7 km. Bedaŭrinde tiutempe la rekta vojo estis barita pro laboroj kaj oni devis kromvojaĝi 30 km, kio kaŭzis

problemojn al la organizantoj. Dum la semajno okazis labor-kunsidoj, prelegoj, debatoj, kunvenis diversaj frakcioj kaj la vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj.



Ĉiuj manĝoj kaj iuj programeroj okazis en la kongres-hotelo *Zum Pass*, kiun posedas esperantistoj. Do, la partoprenantoj ĝuis agrablan etoson dum la tuta semajno. Tuj trans la strato estas agrabla verda ĝardeno kun tabloj kaj benkoj por trankvila babilado. Kelkaj samideanoj loĝis en proksima bone ekipita kaj komforta feria domo *Haus Diana*. La aranĝon partoprenis naŭdek geesperantistoj el 18 landoj. Sabate dum la konatiĝa vespero koncertis Ralph Glomp. Li regalis nin per siaj novaj kantoj.

Dum la dimanĉa inaŭguro la ĉeestantoj de diversaj lan-

daj asocioj kaj kelkaj organizaĵoj salutis la kongreson, inter kiuj ankaŭ IFEF. Estis prezentitaj kelkaj freŝaperintaj libroj. Posttag-meze okazis ekskurso tra la Harz-montaro al la pitoreska urbo *Goslar*.



Impresis nin la impona konstruaĵo *Kaiserpfalz*, la iama imperiestra palaco kaj belega urbodomo. Ĉi-jare la urbo Herzberg am Harz festis dekjaran jubileon de la oficiala alprenado de la kromnomo "La Esperanto-urbo". Vespere la organizantoj Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar prezentis la Centron de Herzberg, la historion de la urbo, iliajn atingojn kaj aktivaĵojn dum tiu periodo.

Lunde oni prezentis la jarraportojn kaj debatis pri artikoloj aperintaj en Sennaciulo. Rob Moerbeek parolis pri monda federismo kaj pri nuntempaj sociaj problemoj. Kun Guy Martin ni diskutis la temon de klimatplivarmiĝo kaj influo de la homo al tiu-ĉi fenomeno. Sekvis debato pri kapitalismo. Poste kunvenis poresperanta fako, vegetarana kaj komunista frakcioj. Vespere ni spektis dramon "La kredito" de Jordi Galcerán prezentata kaj majstre ludata de Georgo Hanzlik kaj Saša Philipoviĉ.

Marde okazis la tuttaga ekskurso al la urbo *Hannover*. En la historia urbodomo ni rigardis maketojn de la urbo en diversaj epokoj. Sekvis vizito al la muzeo *Aŭgusto Kestner*, kiu enhavas kvar malsamajn kolektojn: pri

antikva Egiptio, Grek-romia antikvo, numismatiko kaj artmetio. Dum libera posttagmezo ni promenis tra la urbo malkovrante ĝian belecon. Vespere ni ĝuis prezenton de la loka zibervalo folklorgrupo. Aŭdiĝis popolaj kanzonoj, jodlado (kantado sen teksto kun rapida ŝanĝo inter kap- kaj brustvoĉo) kaj vipado laŭ la ritmo de muziko. Ĉe la fino de tiu vespero juna knabo el Ukrainio prezentis siajn tri kantojn gitarludante. Ĉiuj ĝuis tiun-ĉi vesperon.



Merkrede matene estis du kunvenoj: unua pri la revuo Sennaciulo kaj pri izolitaj membroj. La dua traktis retejojn kaj eksterajn asociojn neesperantistajn. Posttagmeze Rob Moerbeek parolis pri stilfiguroj kaj s-no Gong Xiaofeng (Arko) parolis pri ekologio. Bert de Vit lanĉis interesan temon kaj parolis pri la estonteco de nia vivmedio. Temis pri prognozoj, scenaroj, antaŭjuĝoj, futurologio. Kunsidis LEA-komitato kaj frakcioj de sennaciistoj kaj verduloj. Vespere Peter Kühne prezentis fotojn pri la dua Speciala ekskurso en Nepalo, kiun li partoprenis ĉi-printempe kaj prezentis projekton pri konstruo de Esperanto-domo en Katmandu por NEspA. La SAT-kongreson partoprenis kvin Nepalanoj.

Ĵaŭde matene dum la ĝenerala kunveno estis prezen-

tata financa raporto kaj oni resumis la laboron de la kvar komisionoj. Post la tagmanĝo okazis ekskurso al Herzberg. La urba reprezentanto s-ro Guckel bonvenigis la partopretantojn en la *Welf*-kastelo. Sekvis vizito al la urbodomo kaj al la E-centro. En la piedira ĉefstrato troviĝas Esperanto-kafejo kaj ĝin-senga vendejo. Ĝi estas prizorgata de la esperantista paro Song Jeong-ok (Koreino) kaj Harald

Schicke (Germano). Ankaŭ tiun-ĉi lokon pluraj esperantistoj vizitis. Ili estis ege varme akceptitaj kaj regalitaj per bongusta kafo aŭ teo. Vespere koncertis Ĵak Le Puil akompanata per saksofono de Serĝo Sire. Poste Hideko Huzimoto prezentis Teo-ceremonion.



Laŭ la programo vendrede oni ellaboris Deklaracion kaj Rezolucion. La venonta SAT-kongreso okazos de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2017 en Seulo, Suda Koreio tuj post la 102-a UK.

Liba Gabalda

Kio estas ekologio? Kio estas ekologo? Kio estas ekologia movado? Kiu generacio estas plej ekologia? Jen vasta temo diskutinda sen disputado.

Ecologiste sans le savoir.

A la caisse d'un supermarché, un vieil homme choisit un sac en plastique pour ranger ses achats.

La caissière lui reproche de ne pas se mettre à l'écologie et lui dit:

"Votre génération ne comprend tout simplement pas le mouvement écologique. Seuls les jeunes vont payer pour la vieille génération qui a gaspillé toutes les ressources!"

Le vieil homme s'excuse auprès de la caissière et explique:

"Je suis désolé, il n'y avait pas de mouvement écologiste de mon temps".

Alors qu'il quitte la caisse, la mine déconfite, la caissière ajoute:

"Ce sont des gens comme vous qui ont ruiné toutes les ressources à nos dépens".

C'est vrai, vous ne considérez absolument pas la protection de l'environnement dans votre temps!

Alors, un peu énervé, le vieil homme fait observer qu'à l'époque:

"On retournait les bouteilles de verre consignées au magasin.

-Le magasin les renvoyait à l'usine pour être lavées, stérilisées et remplies à nouveau:

-Les bouteilles étaient recyclées, mais on ne connaissait pas le mouvement écologique".

Il ajoute:

-De mon temps, on montait l'escalier à pied: on n'avait pas d'escaliers roulants et peu d'ascenseurs.

Ekologo sen konscii pri tio.

Ĉe kazo de ĉiovendejo, oldulo elektas platan sakon por ordigi siajn aĉetaĵojn.

La kasistino riproĉas al li, ke li ne havas ekologian konduton, kaj diras al li:

"Via generacio, tutsimple, ne komprenas la ekologian movadon, kaj nun la ĝejnuloj pagos pro la maljuna generacio, kiu malŝparis ĉiujn vivrimedojn".

La oldulo senkulpigas sin ĉe la kasistino kaj klarigas: "Mi bedaŭras, en mia epoko ne ekzistis ekologia movado".

Dum li forlasas la kason, kun afliktita mieno, la kasistino pludiras:

"Homoj kiel vi ruinigis ĉiujn vivrimedojn malavantaĝe al ni."

Vere, je via epoko, vi absolute ne donis gravecon al la protektado de la medio".

Tiam, iom nervoza, la oldulo rimarkigas, ke tiu-epoko:

"Oni redonis la malplenajn botelojn el vitro al la magazenoj kontraŭ iom da mono.

-La magazenoj resendis ilin al la uzinoj, por ke ili estu lavitaj, sterilizitaj kaj denove plenigitaj. Sed, vere, oni ne konis la ekologian movadon."

Li aldonas:

-En mia epoko, oni grimpis la ŝtuparojn piede, oni ne havis rulŝtuparojn, kaj ekzistis malmulte da liftoj.

-Oni ne uzis la veturilon por mallonga irado. Oni pie-

-On ne prenit pas sa voiture à chaque fois qu'il fallait se déplacer de deux rues:

On marchait jusqu'à l'épicerie du coin.

Mais, c'est vrai, on ne connaissait pas le mouvement écologiste.

-On ne connaissait pas les couches jetables: On lavait les couches des bébés.

-On faisait sécher les vêtements dehors sur une corde

-On avait un réveil qu'on remontait le soir.

-Dans la cuisine, on s'activait pour préparer les repas; -on ne disposait pas de tous ces gadgets électriques spécialisés pour tout préparer sans efforts et qui bouffent des watts autant qu'Electrabel en produit.

Quand on emballait des éléments fragiles à envoyer par la poste, on utilisait comme rembourrage du papier journal ou de la ouate, dans des boîtes ayant déjà servi, pas des bulles en mousse de polystyrène ou en plastique.

-On n'avait pas de tondeuses à essence autopropulsées ou autoportées: On utilisait l'huile de coude pour tondre le gazon.

-On travaillait physiquement; on n'avait pas besoin d'aller dans un club de gym pour courir sur des tapis roulants qui fonctionnent à l'électricité.

Mais, c'est vrai, on ne connaissait pas le mouvement écologiste.

-On buvait de l'eau à la fontaine quand on avait soif.

-On n'utilisait pas de tasses ou de bouteilles en plastique à jeter.

-On remplissait les stylos dans une bouteille d'encre au lieu d'acheter un nouveau stylo.

-On remplaçait les lames de rasoir au lieu de jeter le rasoir entier après quelques utilisations.

Mais, c'est vrai, on ne connaissait pas le mouvement écologiste.

-Les gens prenaient le bus, le métro, le train et les enfants se rendaient à l'école à vélo ou à pied au lieu d'utiliser la voiture familiale et maman comme un service de taxi 24 H sur 24.

-Les enfants gardaient le même cartable durant plusieurs années,

-les cahiers continuaient d'une année sur l'autre, -les crayons de couleurs, gommes, taille-crayon et autres accessoires auraient tant qu'ils pouvaient, pas un cartable tous les ans et des cahiers jetés fin juin, de nouveaux crayons et gommes avec un nouveau slogan à chaque rue.

Mais, c'est vrai, on ne connaissait pas le mouvement écologiste!

-On n'avait qu'une prise de courant par pièce, et pas de multiprises pour alimenter toute la panoplie des accessoires électriques indispensables aux jeunes d'aujourd'hui.

ALORS VIENS PAS ME FAIRE CHIER AVEC TON MOUVEMENT ECOLOGISTE!

Tout ce qu'on regrette, c'est de ne pas avoir eu assez tôt la pilule, pour éviter d'engendrer la génération des jeunes cons comme vous, qui s'imaginent avoir tout inventé, à commencer par le travail, qui ne savent pas écrire 10 lignes sans faire 20 fautes d'orthographe, qui n'ont jamais ouvert un bouquin autre que des bandes dessinées, qui ne savent pas qui a écrit le Boléro de Ravel... (pensent même que c'est un grand couturier), qui ne savent pas mieux où passe le Danube quand on leur propose Vienne ou Athènes, etc.

mais qui croient tout de même pouvoir donner des leçons aux autres, du haut de leur ignorance crasse!

diris ĝis la proksima spicvendejo.

Sed, vere, oni ne konis la ekologian movadon.

-Oni ne konis la ĵetebajn bebo-vindojn, oni lavis la ŝtofajn vindojn.

-Oni sekigis la vestaĵojn ekstere sur ŝnuro.

-Oni havis vekhorloĝon, kiun oni streĉis vespere.

-En la kuirejo, oni aktivigis sin por prepari la manĝaĵojn. Oni ne disponis pri ĉiuj tiuj elektraĵaj fakaj ilettoj, kiuj ebligas ĉion prepari sen forto-streĉo, kaj kiuj voras tiom da ŭatoj, kiom Elektrabel produktas.

Kiam oni enpakis fragilajn objektojn sendotajn per la poŝto, oni uzis kiel remburaĵon ĵurnal-paperon aŭ vaton, en skatoloj jam uzitaj, ne aer-bobelojn el polistirena aŭ plasta spongo.

-Oni ne havis tondaparatojn mempropulsatajn, eĉ homportajn, funkciajn per benzino. Oni uzis la forton de la brakoj por tondi la gazonon.

-Oni fizike laboris. Ne necesis iri al gimnastika klubo, por kuri sur rultapiŝoj funkciaj dank'al elektro.

Sed, vere, oni ne konis la ekologian movadon.

-Oni trinkis akvon ĉe la fontano, kiam oni soifis. -

Oni ne uzis forĵetebajn tasojn aŭ botelojn el plasto.

-Oni plenigis la fontoplumojn per inko el botelo anstataŭ aĉeti novan.

-Oni ŝanĝis la razilajn klingojn anstataŭ ĵeti la tutan razilon post kelkaj uzadoj.

Sed veras, oni ne konis la ekologian movadon.

-La homoj veturis per buso, metroo, trajno, kaj la infanoj iris al la lernejo bicikle aŭ piede anstataŭ uzi la familian veturilon, kaj uzi panjon kiel taksian servon tagnakte.

-La infanoj konservis la saman teknon dum pluraj jaroj. -

La kajeroj daŭris de unu jaro al la alia. La farbo-kraĵoj, skrap-gumoj, kraĵono-pintigiloj kaj aliaj akcesoraĵoj daŭris tiom, kiom ili povis, ne ekzistis tekoj kaj kajeroj ĉiujare forĵetitaj fine de junio, nek novaj kraĵonoj kaj gumoj kun nova slogan-reklamo sur ĉiu strato.


Sed, vere, oni ne konis la ekologian movadon.

Ekzistis nur unu elektra konektingo en ĉiu ĉambro, kaj neniu mult-konektingo por nutri la tutan aron da elektraĵaj akcesoraĵoj necesaj por la nuntempaj ĝeunuloj.

Do, bonvolu ne tedeĝi min kun via ekologia movado!

Nur estas bedaŭrinde, ke oni ne havis sufiĉe frue la kontraŭ-koncipan pilolon, por eviti naski generacion de junaj ĝisfundaj stultuloj kiel vi, kiuj imagas esti inventintaj ĉion kaj ĉefe la laboron, kaj kiuj eĉ ne kapablas skribi 10 liniojn sen fari 20 ortografiajn erarojn, kiuj neniam malfermis libron alian ol bildstriojn, kiuj ne scias, kiu verkis la "Bolero-n" de Ravel ... (eĉ pensas , ke temas pri fama vestaĵ-modisto), kiuj ne pli bone scias, kie trafluas la Danubo, kiam oni proponas Vienon aŭ Atenon, ktp... sed kiuj, tamen, kredas povi doni lecionojn al la aliuloj, helpe de sia orgojla vakua cerbo.

Ni lernu per distraĵoj kaj humoraĵoj



JG

HORIZONTALALE:

- Granda grupo da laboruloj.
- Norda lando. INVERSE: muzik-instrument'.
- Determini direkton. Partikulo.
- Ŝvelaĵ' de la radikrono de arboj.
- Prepozicio. Metal'. Koro de arbo.
- Aŭdebla aervibrad'. INVERSE: koiti.
- Eventuale. Grasa fluaĵ'.
- Kazo de deklinacio.
- Mank' de punkteco.
- Latina antaŭnom'. INVERSE : numeralo

VERTIKALE:

- Juna hom'.
- Krado. Bleki.
- Buton' de komputila klavo. INVERSE: dika mamul'.
- Granda mola glando. Kuire.
- Alta konstruaĵ' de préĝejo.
- Tute sen vokaloj. Veni returne.
- Malsama hom'. Centro de kavaĵo.
- Litera nomo. Atomo tute miksitaj.
- Neorganika substanc'. Prefikso.
- INVERSE: eta artikolo en ĵurnalo. Metala minaĵo.

Pafisto iam iris en arbaro, jen li renkontis skolojon.

"Kara, bela, ne pafu miajn idojn," petis la skolojo.

"Kiaj estas viaj idoj?" demandis la pafisto.

"La plej belaj idoj irantaj en la arbaro estas miaj," respondis la skolojo.

"Nu, mi ne volas pafi ilin," diris la pafisto.

Sed revenante, li portis per la mano tutan faskon da skolopidoj, kiujn li estis pafinta.

"Ve, kial tamen vi pafis miajn idojn," diris la skolojo.

"Ĉu tiuj-ĉi estas viaj?" demandis la pafisto, - "mi ja pafis la plej malbelajn, kiujn mi trovis."

"O, jes," diris la skolojo, "sed ĉu vi ne scias, ke ĉiu trovas siajn proprajn idojn plej belajn."



La fama angla politikisto Charles Fox iam vetis kun la tron-heredanto, ke li povus nombri multe pli da katoj en la strato Pall-Mall ol la reĝido. Ili devus iri sur kontraŭaj flankoj de la strato kaj la reĝido havis permeson elekti sian flankon. Ĉe la fino de la strato la reĝido vidis nur du katojn, dume Fox nombris dektri. Kiam la mono estis pagita, Fox rimarkigis, ke li ĉiam estis certa, ke li devus venki. "Kial", diris la reĝido. "Ja", diris Fox, "mi donis al via Princa Moŝto liberan elekton inter la flankoj; - mi sciis, ke vi volus elekti la ombron, sed la katoj ja preferas la sunon!"



Iam estis knabo, kiu vojirante rompis nuksojn; jen li trovis unu verm-boritan, kaj en la sama momento li renkontis Satanon.

"Ĉu estas vere," diris la knabo, "kion oni diras, ke Satano sin povas tiom malgrandigi, kiom li mem volas, kaj trairi truan de kudrilo?"



"Jes," respondis Satano.

"Montru tion al mi, kaj enrampu ĉi-tiun nukson," diris la knabo, kaj tion faris Satano.

Kiam li estis enrampinta tra la vermo-truo, la knabo ŝtopis ĝin per lignaĵeto. "Nun mi vin havas tie-ĉi," li pensis enpoŝigante la nukson.

Irinte iom da distanco, li venis al forĝejo; li eniris ĝin kaj petis al la forĝisto dispecigi tiun nukson por li.


"Jes, tio estas tre facile farota," respondis la forĝisto, prenante la plej malgrandan martelon, metis la nukson sur ambuson kaj ekbatis. Sed ĝi ne difektiĝis. Li prenis martelon iom pli grandan, sed ankaŭ ĝi estas ne sufiĉe peza; li prenis ankoraŭ pli grandan, tamen kun sama rezultato. Nun la forĝisto koleris kaj prenis la martelegon. "Mi do vin dispecigu," li diris, ekbatante tiel forte, kiel li povis; jen la nukso frakasiĝis, tiel ke la duono de la tegmento deflugis la forĝejon, kaj kun krakego, kvazaŭ la dometo estus falonta.

"Mi opinias, ke Satano estis en la nukso," ekdiris la forĝisto.

"Li tie estis," diris la knabo.

La paralela universo troviĝas en Nord-Ameriko

Esperantistoj en Nord-Ameriko malofte havas ŝancon partopreni Esperanto-aranĝojn, ĉar ili kutime okazas sur aliaj kontinentoj, aŭ en distanca parto de la propra kontinento. La apero de multaj novuloj pro la reta kurso de Duolingo akriĝis la bezonon de lokaj renkontiĝoj, kaj la 20-an de aŭgusto sub la ŝildo "Paralela Universo" okazos samtempe 20 Esperanto-aranĝoj.



Ne estas sekreto, ke en la plejmulto de nordamerikaj landoj Esperanto ne estas tiel forta, kiel en multaj aliaj landoj. La ĝenerala grandeco de Usono, Kanado, kaj Meksiko kompreneble malhelpas movadan organizadon. Krom tiu malhelpo, ja estas vere konvinkitaj Esperantistoj en niaj landoj, kiuj subtenas la movadon kiel eble plej forte. Mi persone konas homojn, kiuj veturas pli ol tri horojn ĉiumonate por atingi la kunvenojn de mia urbega klubeto. Sed la nombro de tiuj homoj estas malgranda, kaj ili ofte ne volas veturi tiom multe da horoj nur por duhora kunsido. Ja estas defio por la Esperanto-movado en Nordameriko, ke multaj Esperantistoj ne povas partopreni en ia Esperanto-kunveno. Estas eĉ pli grava proble-

mo, ke ili povus malinteresiĝi pro la manko de komunumo.

Multaj esperantistoj diris, ke ni arigu la disvastigitajn esperantistojn de Nordameriko iel, sed ofte mankis al ni la forto aŭ la organizado por fari ion sufiĉe videbla al la celataj esperantistoj. Antaŭ unu jaro, tiu problemo aktualiĝis pro la furora anglalingva kurso de Duolingo, kiu dissemis novajn verdulojn tra Nordameriko, precipe en anglalingvaj regionoj. Jed Meltzer unue proponis solvon al la aktivuloj de Nordameriko: eventaro, kiu okazos paralele samtage tra Nordameriko.

Du el liaj solvoj meritas apartan citadon. Unue, la eventoj okazos samtempe. Tiel, oni povas dividi la informon kiel eble plej fruktodone. Reklamado per ĉiu metodo estas pli efika tiam, kiam estos multlanda kunvenaro kun evento proksime al multaj legantoj. Due, la evento longe daŭros. En tiuj grandaj landoj indas starigi kunvenojn pli longajn ol la normalaj duhoraj kunsidoj de tradicia Esperanta klubo—precize, duontagaj. Tiel, la longeco de la kunveno valoros la longajn vojaĝojn bezonataj en tiuj grandaj landoj.

Se oni vere volos partopreni, oni povos uzi la ceterajn horojn de tiu sabato por veturi. Oni ne bezonas hotelon, multe da mono, aŭ tiom multe da tempo. La evento konsilas, ke oni povos vojaĝi kvar horojn kunvenen, ĉar la evento komenciĝos kun tagmanĝo kaj finiĝos je la 20-a horo.

La sukceso de tiuj strategioj jam montriĝis. La ideo grandiĝis rapide inter la aktivuloj. Je la verkado de ĉi tiu artikolo, la evento okazos en 20 nordamerikaj urboj de 4 landoj: Kubo, Meksiko, Kanado, kaj Usono. Sed tiu evento ne celas nur konatajn vizaĝojn, kiuj loĝas for de la kutimaj klubejoj.

Fakte, la evento estos por la tuta esperantistaro, kiu, pro Duolingo, estas nun multe pli granda en Nordameriko. Ŝajnas al la organizantoj, ke la plejmulto de la partoprenantoj vere estas novuloj. Rete, ili ofte esprimas sian ĝojon pri la evento, kiu estos la unua en ilia esperantista vivo.

Kio okazos en tiu paralela universo? Unue, la partoprenantoj tagmanĝos en loka restoracio je la 12:00. Multaj organizantoj elektis malmultekostajn restoraciojn de etnaj aŭ lokaj specialaĵoj. Poste, estos sufiĉe da tempo por viziti muzeojn, ludi ludojn, kaj babilu profunde. Certe, la babilado kaj amikiĝo estos la plej grava okazaĵo de la tago.

Por faciligi kontaktojn inter la 20 renkontiĝoj, la organizantoj elektis la mesaĝilon Telegramo kiel la oficialan komunikilon de la tago. Tiel, la partoprenantoj povos dividi fotojn, mesaĝojn, kaj spertojn kun aliaj esperantistoj de Norda Ameriko. La evento finiĝos kun vespermanĝo en alia restoracio. Espereble, la partoprenantoj parolos pri alia baldaŭa renkontiĝo antaŭ la ĝisado.

Se vi volas ekscii pli pri la eventaro, vizitu la oficialan grupon aŭ rigardu la mapon kun ligiloj al ĉiu evento.

Verkis: Hanso BECKLIN (Ĉikago, Usono)

Provlegis: Chuck SMITH (Berlino, Germanio)

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2017 ĝis 2019

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2016 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2017.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2016, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf favor-koste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2017	2018	2019	
		Abono por la papera versio:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj	
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj	
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj	
UEA	MG	<ul style="list-style-type: none"> • Individua Membro kun Gvid-libro tra la Esperanto-movado. • Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 34 jarojn, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago). • Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto 				11 eŭroj
	MJ(-T)					26 eŭroj
	MA(-T)					64 eŭroj
Pag-manieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2017 por 1208					
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2017, 2018					
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)					
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)					

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

"De Karlis al Carlo Rememoroj"

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala. 11 + 2,80 = 13,80 eŭroj

Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

Knabaj petolaĵoj Poemoj de Gérard LESER en la alzaca,

tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

La harplektaĵo de Sylvie Reff Poemoj en alzaca

kun traduko al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

Ĝin rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo

Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio ankaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo 12 + 5,50 = 17,50 eŭroj

Poŝamiko Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn, tekstetojn, kelkajn

ekzercojn kaj laŭtemajn bild-vortarojn riĉe kolor-ilustritajn. 5,10 + 1,40 = 6,50 eŭroj

La 83-a ITALA-KONGRESO 20.-27.8.2016

En bela urbeto *Frascati*, kiu situas en la proksimeco de la ĉefurbo Romo tri grandaj banderoloj en diversaj partoj de la urbeto informis pri la 83-a Itala Kongreso. Ĝi okazis fine de aŭgusto en bela regiono de la Kasteloj, kiun oni povis mal kovri dum la ĉiutagaj ekskursoj. Ĝi prezentas unu el la ĉefaj turismaj altiroj de Italio por turistoj venantaj ĉi-tien el ĉiuj anguloj de la mondo. La historian urbocentron de *Frascati* dominas la katedralo *San Pietro Apostolo*. En la subtegmenta vendoplaco estis instalita ekpozicio pri Esperanto por la publiko.

La kongreson partoprenis iom pli ol 200 geesperantistoj el 30 landoj, inter kiuj pluraj gejunuloj. Ili pretigis bongustan frandan vesperon kaj bone amuziĝis. Dum la tuta semajno regis tre bona kaj varma etoso, ne nur pro la sunarda vetero, kiu superis tridek gradojn ĉiutage.

La oferto de programeroj variis, same kiel ekskursoj. La ĉeftemo de la kongreso estis "Instruado de lingvoj en eŭropaj lernejoj". Komence de la evento okazis lingvopolitika kolokvo, kies temo estis "Esperanto kaj minoritataj lingvoj". Ĝin partoprenis esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj.

Dum la inaŭgura ceremonio festparolis la eksprezidanto de UEA Humphrey Tonkin pri "Esperanto kiel ideo kaj idealo".

Dum la semajno okazis pluraj debatoj, seminarioj, atelieroj, libroprezentadoj kaj vespere kulturaj programeroj. Koncertis Manŭel Rovere, ni spektis orient- kaj baratan dancojn, piankoncerton, pupteatron, ĥoran kantadon. Ĉiumatene okazis tri kursoj je malsamaj niveloj. Bazan kurson por komencantoj gvidis Anna Löwenstein, konversacian Peter Weide kaj perfektigan Nina Pietuchowska.

Paralele okazis aliaj programeroj. Seminario A pri: "La instruado de lingvoj en eŭropaj lernejoj" gvidata de Kristin Tytgat kaj la seminario B pri: "Didaktikaj helpiloj por instruado kaj lernado de Esperanto" gvidata de Katalin Kováts. Ambaŭ estis interese prezentitaj dum la resuma prelego je la fino de la semajno.

Ĉiutage estis duonhoraj prezentadoj de diversaj libroj, kiujn oni povis aĉeti en la libroservo. Tie ankaŭ estis



instalita granda ekpozicio pri origamio. Interesatoj povis sekvi atelieron pri ĝi kaj krei plaĉajn aĵojn por si aŭ por siaj amikoj. Alia

interesa ateliero estis pri kalkulado per "sorobano" gvidata de Kimie Markarian. Muzikan kant-atelieron gvidis Manŭel Rovere.

Inter prelegoj oni povis elekti: "Reĝo de la eŭropaj arbaroj", "Lernado surbaze de projektoj", "Zingibro el Hindujo Okcidenten", "Virtuala vizito al Romo baroka: arto kaj ĉiutaga vivo", "Origamio en la koro de la universo-universala arto komuniki", "Instruado de lingvoj: principoj kaj historiaj hazardoj", "Mia sperto kiel instruistino pri la sveda lingvo". Merkrede, dum la turisma tago, eblis elekti inter du tuttagaj ekskursoj. La unua gvidis interesatojn al Romo, kie en Vatikano ili estis akceptitaj de la Papo dum la ĝenerala aŭdienco. La dua tuttaga ekskurso celis pli naturan programon. Unue okazis vizito de la natura parko *Circeo*, poste vojaĝo laŭ la marbordo al la urbo *Terracina* kaj laste la vizito de sanktejo sur la monto *Spaccat* en la urbo *Gaeta*.

Dum aliaj ekskursoj oni vizitis urbojn: *Palestrina* kaj ties arkeologia muzeo, Romo, *Tuskolo*, *Tivoli* kaj *Subiaco*, *Ostia Antikva*, *Nemi*, *Albano*, *Ariccia*, *Grottaferrata*, *Castelgandolfo* kaj aliajn vidindaĵojn. Bedaŭrinde en tiu tago okazis en

la centra Italio forta tertremo dum kiu pereis kelkcentoj da homoj.

Fine de la semajno estis projekciata filmoprezento pri la antikva urbo *Heraklea*, situanta en suda Italio ĉe

la Ionia maro. Tie okazos de la 26-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro la venontjara Itala kongreso.

La fermo de la kongreso okazis en urbeto *Monte Porzio Catone*, kie ni spektis dancojn kaj popolokantojn de la folkloro aranira. Gaja muziko, viglaj kaj energiaj dancoj kreis unikan etoson dum kiu ni bone amuziĝis kundancante ĉe la fino.

Dankon al la organizantoj pro sukcesa kaj bone aranĝita kongreso. Ni ĝuis neforgeseblajn momentojn kaj gajan etoson en la "Rondo familia". La Italaj kongresoj ofertas al la ĉeestantoj aron da kulturaj kaj turismaj eventoj. Do, estos plezuro partopreni venontjare en *Heraklea*.

Liba Gabalda





BET-52 en Litovio de la 2a ĝis la 10a de Julio

De la 2a ĝis la 10a de julio en Litovio en urbo Birŝtonas okazis la BET-52 (Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiujn laŭvice aranĝas tri baltaj ŝtatoj, Litovio,

Latvio kaj Estonio). Unuafoje ĉi-renkontiĝo okazis en 1959.

La BET-52 partoprenis pli ol 300 esperantistoj el 27 landoj, venis ne nur eŭropanoj kaj najbaroj, sed kelkaj esperantistoj de malproksimaj landoj, el Pakistano, Suda Koreio ktp.

La Tagoj havis altan protektanton, la ĉefministron de Litovio, Algirdas Butkevičius.

La urbo Birŝtonas estas pitoreska, kurac-urbo, facile atingebla aŭtobuse aŭ trajne ekzemple de Vilno aŭ Kaŭnas. La rivero Nemunas trafluas la urbeton kaj vivigas la pejzaĝon. La urbeto estas konata pro multegaj famaj ban-lokoj, kie eblas ricevi flegojn por diversaj malsanoj. Oni trinkas la sanigan akvon, ricevas banadojn kaj aliajn sanigajn flegojn.

La programo de la Tagoj estis vasta kaj valora. Oni foje komparas BET al Universala Kongreso, ĉar la Litovaj BEToj kultivas la tradiciajn UKerojn, kiaj Somera Universitato, diversnivelaĵ kursoj de Esperanto, ekskursoj, artaj aranĝoj k. s. Sed kontraste al UK-oj, kie okazas pagataj lingvokursoj, la tuta diversnivela instruado dum BET estas tute senkosta por la partoprenantoj. Ĉiutage spertaj instruistoj Stano Marček (Slovakio), Aida Čižikaitė (Litovio), Nina Pietuchowska (Pollando), Mikaelo Lineckij (Ukrainio) kaj tri ruslandanoj (Irina Gončarova, Svetlana Smetanina kaj Abduraĥman Junusov) gvidis divers-nivelajn lingvajn perfektigojn sub la kunordigo de Gražina Opulskienė.

La klerigan programon kompletigis pluraj apartaj prelegoj pri variaj temoj, iuj rilatis al la fenomeno Esperanto, aliaj al ĝeneralaj temoj, kiel kosmo kaj astronomio, kulturo de Pakistano kaj Nepalo, rilatoj inter homo kaj besto, defendaj konstruaĵoj de la 19a jarcento, fabeloj kaj historiaj eventoj ktp.

Per la prelegaro de profesoro Aloyzas Gudavičius sciemuloj konatiĝis kun la litovaj lingvo, kulturo kaj historio. Sian kurson "Esperanto en interkultura komunikado" prezentis profesorino Ilona Koutny el la Poznana Universitato Adam Mickiewicz (Pollando). Profesoro Walter Ŝelazny el la Bjalistoka

Universitato faris ciklon pri bazaj elementoj de judaismo.

La plej altnivela kaj neforgesebla kultur-evento estis la piano-konzerto en Kulturdomo. La pianisto, varsovia muzika profesoro Jerzy Dobrzyn'ski el la Varsovia Muzika Universitato ludis la muzikon de Frederik Chopin. Koncertis ankaŭ Jo-Mo, Sepa kaj Asorti, Ĵomart kaj Nataŝa, Mikaelo Bronŝtejn. Saŝa Pilipoviĉ kaj Georgo Handzlik prezentis modernan historion "La kredito".



Same kiel en UK, ankaŭ en BET estas ekskursaj tagoj. La tut-taga ekskurso ebligis ekkoni la plej belajn bienpalacojn de la etnografia regiono Sūduva. Krome duontaga ekskurso ŝipe veturigis la partoprenantojn al Kaŭno, kaj pieda ekskurso konigis interesulojn de Birŝtonas. Grupo da dezirantoj vizitis produktojn de medo "Lietuviŝkas Midus" (miela alkoholo) en Stakliškės kaj gustumis ĉi tiun tradicion litovan drinkaĵon".



Ĉiutaga plenkolora gazeto "Balenido" redaktata de Stano Marček informis pri la taga programo, donis detalajn informojn pri personoj kaj aranĝoj, aperigis fotojn kaj raportojn.

Por la unua fojo en la moderna historio de BET okazis granda kvizo, kiun lerte gvidis la nesuperebla kviz-majstro Marian Zdankowski el Pollando.

Esperantistoj partoprenis en la litova ŝtata festo – Tago de la ŝtato, de kelkaj jaroj festata la 6an de julio je la 21a horo samtempe en diversaj lokoj de la mondo, kie litovoj loĝas. En la parko de Vytaŭtas kolektiĝis urbanoj kaj gastoj de Birŝtonas por kune kanti la litovan himnon. Estis aranĝita partopreno de esperantistoj kaj internacia grupo kantis la Nacian Glorkanton en Esperanto.



Fotis kaj raportis Galina

LA 49-a ILEI-KONFERENCO EN NYÍREGYHÁZA

Ĝi okazis de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2016 en la universitato de *Nyíregyháza*, kiu situas en la orienta parto de Hungario. La eventon partoprenis 120 geesperantistoj el 28 landoj. La plej foraj partoprenantoj venis el Brazilo, Ĉinio, Japanio, Koreio, Kubo, Nepalo, Pakistano, Togolando kaj Usono. Ni loĝis en bela kaj komforta hotelo *Bessenyei*.



La programo komenciĝis sabate per interkona frandvespero. La partoprenantoj alportis el siaj landoj variajn manĝaĵetojn kaj trinkaĵojn por gustumigi al aliaj. Tiamaniere oni bone konatiĝas. La vesperon muzike animis Attila Schimmer el Aŭstrio kaj kelkaj kuraĝuloj akompanis lin kantante kaj dancante. Ekestis tre amika etoso kaj ĉiuj bonege amuziĝis.

Dimanĉe okazis solena inaŭguro kun ĉeesto de la rektoro de la universitato, de la vicprezidanto de la departamenta konsilio kaj la honora prezidanto de HEA. S-ro

Attila Petneházy deklamis poemon “La Vojo”. Nome de UEA salutis la ĉeestanta estrarano Lee Jung Kee. Estis legata salutmesaĝo de la hungara sekcio de fervojistoj, kiun sendis István Gulyas. Post la malfermo ni fotiĝis ĉe la enirejo. Vespere okazis Nacia Vespere. Koruso *Balsa* kantis esperante kaj hungare, duopo ludis ne tro kutiman instrumenton citro, juna kantistino plezurigis nin per sia bela voĉo kaj ĉe la fino prezentiĝis la loka folkloro grupo ofte ŝanĝante danckostumojn. Ĉiuj partoprenantoj ĝuis tre belan kaj riĉenhavan vesperon.

La programo de la konferenco kaj de la lingva simpozio, kies temo estis “Novaj vojoj de lernado” estis bunta kaj bone plenumita. Dum la semajno okazis E-kursoj, instruista trejnadado, diversaj prelegoj, debatoj, diskutrondoj, atelieroj. Oni parolis pri E-instruistaj spertoj, pri E-centroj, pri interkultura edukado, pri universitata agado, pri spertoj de la projekto “Comenius”, pri interlingvistikaj studoj en Poznano, pri Esperanto en infanĝardeno, pri stilfiguroj, pri E-o en Afriko kaj specife en Togolando. Oni povis



lerni la hungaran lingvon eksprese. Estis prezentita filmo “Laŭ spuroj de Tibor Sekelj”, eblis lerni Baladajn ĉendancojn aŭ sperti pri Aikido. Estis prezentita la projekto “Jaro de la lernanto”, kiu estis oficiale lanĉita en Nitro dum la UK. Ne mankis lingva festivalo, kiu okazis en bela loko de

etnovilaĝa subĉiela muzeo-skanseno. Prezentiĝis 26 lingvoj inkluzive signa lingvo, afrika evegbe, pakistana punĝaba kaj urdu, ĉuvaŝa, toki pona... Poste ni povis libere trarigardi la skansenon.

Ĉar la partoprenantaro de ILEI-konferencoj kreskas, la komitato decidis nomi la venontan konferencon de ILEI-kongreso. Dum la korea vespero la Koreoj prezentis per filmo la venontjaran kongresurbon *Busan*. La partoprenantoj ricevis USB-memorilon kun pliaj dokumentoj kaj dosieron pri *Busan*. Ĉe la fino du koreaj spertulinoj instruis al ni tradician maskodancon. La vespero finiĝis en agrabla etoso ĉe manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.



Dum la duontagaj ekskursoj ni promenis en la urbo *Nyíregyháza* kaj en la proksima sallaga bankuracejo *Sóstó*. Tie troviĝas ankaŭ bestĝardeno kaj la jam menciita skanseno. La tuttaga ekskurso estis eventoriĉa. Ni vizitis la urbon *Tokaj* kaj ĝian faman vinkulturan regionon. En vilaĝo *Mád* ni admiris riĉe pentritan barokan sinagogon de la 18-a jarcento. Poste ni haltis en urbo *Abaújszántó*, kie ni vizitis muzeon kaj memorĉambron de Kálmán Kalocsay. Sur la placo ni fotiĝis ĉe lia busto. Juna urbestro venis persone bonvenigi nin kaj regalis nin per aperitivo. Post bongusta tagmanĝo ni daŭrigis nian vojaĝon al la urbo *Szerencsi*, kie ni vizitis ĉokolad-fabrikon. Post la instrukcioj ni mem kreis dekoraĵojn sur ĉokolado kaj

rememore kunportis ilin. Dume ni gustumis plurajn specojn de ĉokoladaj bombonoj. La lasta halto estis en la vilaĝo *Tarcal*, kie ni en privata vinkelo gustumis tri specojn de vinoj, kiujn oni poste povis aĉeti. Ĉe la sunsubiro ni kantante en la buso gaje revenis.

La internacian vesperon plenumis la partoprenantoj mem. Ni admiris orientstilan, nepalan kaj ĉinan dancojn, aŭskultis rakonton pri slovaka popolo, spektis filmon pri Pakistano, ĝuis diversajn kantojn, gitar- kaj violonludadon. Ĵaŭde okazis abunda bankedo kaj alternative vespera promenado tra arbaro ĝis la lago de *Sóstó*. La adiaŭan vesperon gajigis muzikistoj kaj la loka grupo prezentis kelkajn folklorajn dancojn. Poste ĉiuj kundancis kaj kantis en Esperanto.



Dum la fermo Zsófia Kóródy prezentis novan maskoton por la instruado amuzan muson. Post la ferma parolado la prezidantino Mireille Grosjean disdonis atestilojn al la partoprenantoj de la E-kursoj kaj al tiuj de la instruista trejnado. Ĉe la fino ŝi dankis al la organizantoj pro bona sukceso de la konferenco. Lastminute estis prezentata plano por konstruado de Esperanto-domo en Katmanduo por la Nepala E-Asocio.

Dum la fermo Zsófia Kóródy prezentis novan maskoton por la instruado amuzan muson. Post la ferma parolado la prezidantino Mireille Grosjean disdonis atestilojn al la partoprenantoj de la E-kursoj kaj al tiuj de la instruista trejnado. Ĉe la fino ŝi dankis al la organizantoj pro bona sukceso de la konferenco. Lastminute estis prezentata plano por konstruado de Esperanto-domo en Katmanduo por la Nepala E-Asocio.



Dum la fermo Zsófia Kóródy prezentis novan maskoton por la instruado amuzan muson. Post la ferma parolado la prezidantino Mireille Grosjean disdonis atestilojn al la partoprenantoj de la E-kursoj kaj al tiuj de la instruista trejnado. Ĉe la fino ŝi dankis al la organizantoj pro bona sukceso de la konferenco. Lastminute estis prezentata plano por konstruado de Esperanto-domo en Katmanduo por la Nepala E-Asocio.



"Kune por Eŭropo" / **KpEu** (Together for Europe – T4Eu) estas la movado, kiu organizis amasan eventon en Munkeno (Bavario) inter la 30a de junio kaj 2a de julio. Ĝi okazis sub la patronecoj de s-roj Jean-Claude **Junker** (prezidanto de Eŭropa Komisiono) kaj Thorbjørn **Jagland** (sekretario de Eŭropa Konsilantaro). En la unuaj du tagoj oni interŝanĝis spertojn kadre de la multaj forumoj kaj ĉirkaŭ 36 panelaj tabloj.



Kune por Eŭropo: Renkonto, repaciĝo, estonteco



Ekde 2004, tio estis jam kvara kunveno. Oni organizis la antaŭajn KpEu en Stuttgart (2004, 2007) kaj en Brukselo (jaro 2012, samtempe kun lokaj renkontiĝoj en aliaj 152 urboj de Eŭropo). La ĉijara evento alfrontas kernajn defiojn de la kontinento: repaciĝo kaj frateco, subteno de la familio, protektado de homa vivo kaj de la naturo, justa ekonomio, solidareco kun la malriĉaj kaj kun tiuj troviĝantaj margene de la socio. Antaŭ ĉio, KpEu respondas al "kulturo de reciprokaj kontaktoj" per kiu unuopaj personoj kaj la popoloj pli bone konatiĝos unu kun la alia. Sekve ili lernas trakti la alian kun respekto kaj apogi en agoj por la komuna bono.

*Rezignacio kaj laciĝo ne apartenas al la vera animo de Eŭropo.
Eĉ niaj problemoj povas fariĝi fortaj inspiroj por unueco.*

"Nuntempe, pli forte ol iam ajn antaŭe, Eŭropo sentas la bezonon kunlabori por la unueco. Bedaŭrine, al ĝiaj gvidantoj ŝajnas manki la kapablo necesa por alfronti la plej gravajn defiojn" – komentis profesoro A. **Ferrara**. Tio estis aludo pri manko de la politikistoj kun vasta rigardo. Konklude li demandas: "Ĉu ni rigardas en malĝustan direkton? Eble ni pensas ke oni bezonas pli da politikaj gvidantoj anstataŭ aprezi valorojn de nia civila, pli juna socio – kun partopreno de junularo kaj ĝia politika kreivo. Ili facile imagos la t.n. Maljunan Eŭrokontinenton kiel la "novan" kiun ili fortigos per sia entuziasmo kaj energio.



Romano Prodi – eksa itala ĉefministro kaj prezidinto de la Eŭropa Komisiono

Sekve aŭdiĝis ankaŭ fortaj voĉoj de la junularo. *Mi sonĝas pri Eŭropo kiu estas amikema kaj malpli individueca. Eŭropo komenciĝas ĉi tie en mi, ĉar ankaŭ mi estas Eŭropo* – diris ĉeĥa kanbino Maria.

"Ni diru JES al pontoj de pardono kaj mizerikordo, JES – por malkovri la riĉecon de europaj kulturoj, JES al kompreno ke - por krei unuecon - ni devas unue forigi multajn murojn, kiuj dividas nin" – tia estis alvoko de prof. **A. Riccardi**. "Kune por Eŭropo" arigis pli ol 300 kristanajn movadojn kaj komunumojn, kiuj apartenas al diversaj eklezioj en Eŭropo. Respekte al sia sendependeco, ili kreis la reton de kunlaboro por harmonie realigi la kongruajn celojn. Tiumaniere, ĉiu movado povas kontribui uzante sian specifan karismon same kiel la riĉa diverseco de eŭropaj kulturoj, lingvoj kaj regionoj. Respekto al tiu diverseco estas ĉiam subteninda. *Unueco realigeblas, kaj repaciĝo kun mizerikordo kreas la novan kulturon de bonkvalitaj rilatoj. Tiel malfermiĝas pli hela estonteco por niaj familioj kaj komunumoj, same inter la najbaroj kaj popoloj* – diris M. Voce, prezidanto de Fokolaro.

*

Tago tria / la 2an de julio 2016



Vespere en la tria tago (la 2an de julio) la kongreso kulminis per amaskunveno subĉiela, en la urba malfermita **Karlsplatz** (Placo de Karlo, la tieuloj nomas ĝin *Stachus*) – kun 5,000 personoj. La festeno daŭris ankaŭ en aliaj placoj kaj stratoj de la urbo. Ĉiu partoprenanto estis invitita subskribi la solenan devontiĝon por "esti katalizilo de la nova vizio por Eŭropo".

Per malfermita dialogo kaj profunda kulturo, ni povas proksimiĝi al ĉiu homo, esti komprenema kaj - en kazo de malfacilaĵoj - helpi lin. Atestoj de amikeco inter la eklezioj kaj komunumoj konfirmis, ke "repaciĝo malfermas futuron".

Gerhard Pross el gvida komitato de KpEu deklaris: "Kvankam ni malsamas kaj estos malsamaj, ni volas vivi en unueco kaj estis riĉigitaj per tiuj diferencoj. Ni volas ekstendi tiun ĉi bonvolan mesaĝon tre diversaj urboj, en la tuta Eŭropo". La universala amikeca reto ekzistas jam 15 jarojn kaj vicprezidanto de la Monda Luterana Federacio, Frank **Otfried** diris: "Kiel eklezioj, ni spertas bonan kunlaboron kiu alportas realajn fruktojn – ni helpas la rifuĝintojn, ni preĝas kune por justeco kaj paco. Ni volas ke Kristo, kun sia mesaĝo pri amo al najbaroj, restu ĉiam grava centro de la eŭropa vivo".


Serafimo **Joanta**, metropolito de la rumana ortodoksa eklezio dividis la malĝojon kaj esperon de sia misio: "Ni bedaŭras, ke ekzistas tiaj fortoj, kiuj subfosas nian laboron por unueco de la kristanoj, kio malbone influas la junan generacion. Tamen ni fidus ke la frateca reto helpas nian noblan strebadon". Poste venis la kortuŝa momento, kiam miloj de la ĉeestantoj deklamis unisone la universalan preĝon *Pater noster* (Patro nia). Ĝenerala Sekretario de la Monda Konsilio de Eklezioj, Oav Fykse **Tveit** klarigis: Tio estas profeta signo de repaciĝo kaj pardono ka ni volas neniam ĝin forgesi".



Infanoj – la futuro de Eŭropo kaj de ĉiu familio, paŝetas tra la festa urbo. Ili ankaŭ partoprenis en KpEu.

Inter diversaj mesaĝoj kaj salutoj, sur grandega ekrano aperis papo Francisko kaj ekumena patriarko de Konstantinopolo, Bartolomeo. Per satelito ili esprimis apogon por la iniciato kaj sendis kuraĝigajn vortojn.

Nia fototeko pri la 101a Universala Esperanto Kongreso



Fotoj de Liba kaj Andreo